



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

Jara abono

30,-- GM

**Eldonanto/Herausgeber:**

Ludwig Pikel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69  
Poŝtĉekkonto  
Nürnberg 819 56-851

N-ro 33/77 - 23 aŭg. 1977  
Aperas ĉiusemajne

### FELIX EPSTEIN 95-jara

La 3-an de septembro 1977 festos la Esperanto-pioniro, Felix Epstein, Hamburg, honora membro de Germana Esperanto-Asocio kaj Hamburga Esperanto-Societo sian 95-an naskiĝdatrevenon kun sufiĉe freŝa energio kaj vigla intereso por ĉiuj flankoj de la Esperanto-movado.

En Genevo antaŭ 77 jaroj li konatiĝis kun Esperanto kaj lernis ĝin en la jaro 1906. Jam en la LKK por la 4-a Universala Kongreso de Esperanto en Dresden li kunlaboris kaj konatiĝis kun d-ro L. L. Zamenhof. Ankoraŭ hodiaŭ ekzistas la Nordokcidentgermana Esperanto-Ligo (NOGELO), kiun s-ano Epstein kunfondis en 1910.

Felix Epstein laboris en la Hamburga "bank-domo Warburg" kiel prokuristo ĝis 1933 kaj estis arestita ĝis la fino de la 2-a mondmilito en la koncentrejo "Theresienstadt".

Post la milito s-ano Epstein tuj revenis Hamburgon kaj laboris en la kuratorio de la Israelita Malsanulejo tre aktive. Li kunreorganizis la Germanan Esperanto-Asociacion kaj eniris la estraron de GEA inter 1947 - 1951. En postaj jaroj li estis prezidanto de la Konsilantaro de GEA kaj komitatano de UEA. Jam en 1928 li ricevis la honoran insignon de GEA kaj en 1957 oni nomis lin "Honora Membro" de GEA.

La tuta esperantistaro gratulas kun atestimo al la jubileulo Epstein kaj deziras al li fortan sanecon kaj feliĉon por la estonteco.

La adreso de la jubileulo Epstein estas: Ludolfstr. 50, D-2000 Hamburg 20, Tel. 040/48 73 71.

Hella Lanka, Sekretariino de NOGELO

Ankaŭ Pilo-Press kore gratulas al la jubileulo!

### La laboro de la 62-a Universala Kongreso

Dum la Solena Fermo de la 62-a Universala Kongreso, la 6-an de aŭgusto, la nova ĝenerala sekretario de UEA, d-ro Werner Bormann, donis super-rigardon pri la laboroj de la kongreso. Li akcentis kiel elstaran trajton la fakton, ke la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, s-ro M'Bow, ĉeestis en la Solena Inaŭguro kaj parolis pri la temo. Ankaŭ la ĉeesto de la ŝtatprezidanto de Islando, la esperantlingva parolado de la kulturministro kaj la referaĵo de ambasadoro Harry dokumentas la signifon de la kongreso.

La kongresa temo estis "La rajto je komunikado". Ĝin traktis pluraj kurvenoj, prelegoj, diskutgrupoj kaj publika podia diskutado. La dua ĝenerala kunsido de UEA, la 5-an de aŭgusto, same estis dediĉita al la kongresa temo. La unuan referaĵon faris la sekretario de la UNESKO-komisiono en Islando, s-ro Andri Ĥaksson, kiu specialiĝe atentigis, ke en UNESKO la malgrandaj lingvoj ne ricevas sufiĉan atenton. Li ankaŭ esprimis la supozon, ke la ŝancoj de pli serioza priatento por Esperanto ĉe UNESKO kreskos. Ankaŭ usona fakulo pri komunikado, prof. Leonard Sussman el Novjorko, diris ke la ŝancoj de Esperanto estas des pli grandaj, ju pli komplikigas la monda lingvo-problemo. Li vidis ŝancojn por Esperanto, se la movado atentigas "la neŭtralecon de la organizaĵo kaj la kvaliton de la lingvo". Esperanto, laŭ li, troviĝas je la flanko de

protektantoj de demokrata kultura pluralismo. Prof. Sussman rekomendis, ke oni devas insisti ĉe internaciaj organizaĵoj pri esplorado de la demando uzi lingvon kiel Esperanton. Esperanto povus grave kontribui al la realigo de la Homaj Rajtoj. Flanke de la kongreso siajn vidpunktojn interŝanĝis dum podia diskuto prof. Kameskov (Soveta Unio), prof. Pool (Usono) kaj d-ro Lins (FR Germanio).

La 4-an de aŭgusto okazis podia diskuto pri la kongresa temo malfermita ankaŭ al la publiko. Sub prezido de d-ro Tonkin diskutis d-ro Blanke (GDR), s-ro Daŝgupto (Hinda Unio), s-ino Silja Aoyalsteindóttir (lektoriĉno pri Islanda lingvo kaj literaturo en la universitato de Rejkjaviko), s-ro Haraldur Olafsson (lektoro pri antropologio) kaj s-ro Thorojörn Broddason (lektoro pri sociologio).

Ses laborgrupoj traktis la komunikadon en la Esperanto-movado. Temoj estis la Esperanta radiofonio, la Esperanta gazetaro, eldonado en Esperanto, korespondado per Esperanto, la Delgita Reto de UEA kaj komunikado interne de UEA. Ankaŭ pluraj prelegoj en la kadro de Internacia Somera Universitato havis rilaton al la kongresa temo, ekzemple tiu de prof. Jonathan Pool "Ĉu komunikrajtoj povas esti egalaj?"

Parolante pri la laborkunsidoj de UEA d-ro Bormann menciis, ke la Komitato kunsidis dum 18 horoj. Okazis proksimume 20 kunsidoj de la Komitataj komisionoj. La unua ĝenerala kunveno de UEA, la 1-an de aŭgusto, diskutis pri la Estrara Raporto kaj sub la prezido de prof. Stöp-Bowitz inkluzivis podian diskuton pri la temo "UEA sin preparas por la estonteco". Elstaris la demandoj: Ĉu ni havas sufiĉe da instruistoj? Ĉu ni estas preparitaj por la antaŭenigo de Esperanto en la Tria Mondo? Ĉu entute la movado kapablas fronti la problemojn de la estonteco?

Resunante d-ro Bormann diris, ke la movado ricevis fortan kuraĝigon, eĉ valorajn konsilojn de eksteruloj dum tiu ĉi kongreso. Restas nia tasko gardi la neŭtralecon de la asocio, priatenti la kvaliton de la lingvo (laŭ la konsilo de prof. Sussman) kaj ankoraŭ pli bone organize prepari nin por la estonteco.

(Teksto laŭ la Kongresa Gazetara Servo)

### Esperanto en Radio

Varsovio dum la pasinta Esperanto-Ekspreso disaŭdigis plian parton de la parolado de UEA-prezidanto Tonkin dum la kongresa malfermo kaj la resumon pri la kongresa laboro de d-ro Bormann. Dum la lastaj tagoj aŭdigis pli da programoj pri Esperantaj temoj: portretoj de elstaraj polaj esperantistoj (Zamenhof, Grabowski), intervjuo kun la usona esperantisto Balbin, trarigardo de la Esperanta gazetaro. En la leterkesto nun denove estas menciata ĉiusemajna statistiko pri ricevitaj korespondaĵoj kaj la nomoj de la "korespondaj kolonoj". Ŝanĝo okazis ankaŭ rilate la formon de la koncerto kun bondeziroj, laŭ anonco la nuna formo estas malnoviĝinta. Ĝia nomo estos estonte "Aŭskultantoj por aŭskultantoj". Oni atendas tiufilate reagojn, proponojn ktp. de aŭskultantoj.

Vatikano ĉi-foje disaŭdigis intervjuon kun hungara esperantistino pri Esperanto en Hungarujo kaj ampleksan leterkeston.

Romo estis sufiĉe bone aŭdebla. El al leterkesto montriĝis ke ankaŭ aliaj aŭskultantoj povas bone ricevi la Romajn sendojn.

Vieno. Ambaŭ elsendoj, la kurtondaj kaj la mezanda, estas bonege kaptetbla.

Svisa Kurtonda Radio. En la elsendo de Claude Gacond s-ro Olivier Tzaut donis ekzemplojn el sia disko kun Esperanto-kantoj. D-ro A. Baur parolis tre interese pri la svisa banksekreto kaj la numeraj kontoj.

Anonco Aperis Eŭropa Kalendaro 1977, ludiga kaj lerniga (ne nur) por infanoj en la lingvoj de Eŭropa Unio, eldonita de Eŭropa Klubo Paderborn. Prezo 4,90 DM. Mendebila ĉe Libroservo Ludwig Pickel Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

## Salutoj - Reagoj

Kara atestimata amiko Pilo!

Mi ne volas forlasi Germanion kaj Eŭropon sen saluti vin kaj gratuli por via bona informlaboro, kiu estas vere modela! Mi daŭre kalkulas je via informservo - precipe nun, ke mi portas la gravan respondecon de estrarano de UEA.

Mi persone estas konvinkita pri la neceso de pionira laboro en la t.n. Tria Mondo, precipe en Sudameriko. Nur pro tio mi akceptis la "inviton al laboro", kvankam gesamideanoj gratulas min por la "honoro" - tute erare. Mi bezonas ne gratulon sed kuragiĝon!!

Ni kaptis la okazon viziti Esperanto-klubojn en Münster, Schwelm kaj Frankfurt por danki persone al la Esperanto-fervojistoj (Schrapp, Brandenburg, Schindler, Kruse Elfriede) kiuj dum la lastaj du jaroj subtenis nian socian laboron en la Tria Mondo per sendado de pli ol 40 pakaĵoj de materialoj (vestoj uzitaj, libroj, mastrumadmaterialetoj). Eĉ la urbestro de Schwelm ĉeestis en plenplena salono kaj transdonis la flagon de la urbo por Bona Espero.

Kore Ursula Grattapaglia

\*\*\*\*\*

De la Internacia Esperanto-Kampadejo Primoŝteno ni ricevis jenan salutkarton: "Ĝuante la Esperanto-etoson, triestaj kaj tutmovadaj gesamideanoj tutkore salutas Elda Doerfler Rupini, Tibor Sekelj kaj aliaj

\*\*\*\*\*

Elkore mi gratulas al Vi, ke Vi ricevis honoran insignon pro Via agado en Esperanto-Movado. Mi tralegis pri tio ĉi en ĵurnalo "Ilustrowany Kurier Polski" (Pola Ilustrita Ĵurnalo) en artikolo de red. Kazimierz Małycha. Li tre ofte skribas pri Viaj atingoj sur kampo de Esperanto, eĉ sendis al mi kelkajn numerojn de Via "PILO-PRESS". Vi multe skribas pri polaj aferoj kaj helpas al polaj esperantistoj.

Krystyna Hibner-Kazakova, Pollando

\*\*\*\*\*

## Pri Andrzej Pettyn kaj Petinaĵoj

Laŭ felietono de Pola Radio de la 10-a de aŭgusto ĵus aperis nova vortaro pola - Esperanta de Andrzej Pettyn en eldonkvanto de 5000 ekzempleroj. El la felietono ni citas:

"Parenteze dirite - nemultaj estis en nia lando aŭtoroj de vortaroj polaj - Esperantaj, kio povus - la fakto - esti miriga. Se mi ne eraras - ili estas laŭvice: Antoni Grabowski, Mieczysław Guterman kaj Kazimierz Tymiański. Do - kiel la kvara notiĝis hodiaŭ Andrej Pettyn.

Estas, do, bona okazo paroli kelkfraze ankoraŭ pri - mi tiel diru - Petynaĵoj, ĉar - kiel ni jam informis en nia programero - dum la finiĝinta lastsabate en Rejkjaviko Universala Kongreso de Esperanto oni elektis s-anon Andrzej Pettyn en la Estraron de la Universala Esperanto-Asocio.

Kaj do mallonge pri li mem: Li estas aŭtoro de dekelkaj lernolibroj, ekzercaroj kaj lastatempe vortaroj, el kiuj kelkaj estis plurfoje reeldonitaj, kiel ekzemple la diskokurso, kiu atingis la eldonkvanton de 45 miloj da ekzempleroj.

En aŭgusto, en la fino de la nuna monato, aperos lia "Esperanto - pola vortaro", 165-paĝa, enhavanta 8 800 glosojn. Laŭ la eldonplano de PEA, en oktobro estos aperigita lia tute nova lernolibro: "Fundamenta kurso de Esperanto" (15-leciona).

Li gvidis kelkcent kursojn en Pollando kaj krome en eksterlando, en GDR kaj Finnlando. En la lastaj jaroj li ankaŭ okupiĝis pri traduko de

### Pri A. Pettyn kaj Petinaĵoj (daŭrigo)

teatraĵoj; oni prezentis en lia traduko interalie "Forĝiston" de la elstara pola verkisto Gustaw Morcinek, "Princo de Portugalio", "Rakonton pri libereco" kaj "Poemon pri princo Eriko"; ĉi-lastan - en la kastelo de Darłowo, kadre de prezentadoj de la speco "lumo kaj sono". Sed, kiel li mem konfesas, kiel sian plej rimarkindan tradukon li konsideras "Kaj tamen estas Varsovio", ĉu s-ano aktoro Andrzej Tomecki prezentis en multaj landoj.

Por multaj kantistinoj, kiel ekzemple por Danuta Alczewska-Klus, li tradukis ariojn, kantojn kaj kanzonojn.

Aktuale s-ano Pettyn estas vicprezidanto de la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio kaj li okupiĝas pri informado. En la pasinta jaro li fariĝis membro de la Akademio de Esperanto.

Al s-ano redaktoro Andrzej Pettyn - ni deziras plej multajn efikojn sur lia nova posteno, en la Estraro de la Universala Esperanto-Asocio."

La felietonon verkis Jan Klimek. Ni aldonu, ke Andrzej Pettyn estas redaktoro ĉe la Pola Radio.

### Esperanto en Televido kaj Radio

#### En la Dua Germana Televido (ZDF)

Lunde, la 22-an de aŭgusto, vespere je la 18-a horo, oni povis vidi la 5-minutan reportaĵon pri Esperanto kadre de la programo "Drehscheibe". Oni montris scenojn el la inaŭguro de la Hamburga Esperanto-klubejo pasintan aŭtunon, mallongan intervjuon kun Elisabeth Bormann, GEA-prezidantino kaj du erojn el la SAT-kongreso en Augsburg. S-ino Wielgus enkonduke legis kelkajn versojn el "Ioreley" de Heine, oni montris Esperanto-librojn por montri ke Esperanto estas "kultura lingvo", oni aŭdis la voĉon de N. Rytjkov, citante el la monologo de Bruto. Bedaŭrinde la mallonga sceno el la teatraĵo "La Justuloj" ne estis tre efika. La komentisto agnoskis ke la esperantistoj inter si ne havas interkompreniĝ-malfacilaĵojn. Kiel pruvon oni montris grekon, francon, hungaron, usonanon (Tucker) kaj germanon (Ipfelkofer). Sed kial ili ne interdiskutis en Esperanto?

La elsendo havis pozitivaĵojn, sed ankaŭ negativaĵojn. Estus interese ekscii reagojn de ne-esperantistaj spektantoj. Kiu povas raporti pri tiaj? Komento pri la elsendo sekvos!

#### Aŭstria Televido, Dua Programo

Aŭstria Televido, Dua Programo, elsendos en la programero "Eintritt frei" ampleksan raporton pri Esperanto kaj la Internacia Esperanto-Muzeo la 5-an de septembro 1977, je la 20,50 horo. (Se pro iu ajn kaŭzo ĝi ne okazos je la nomita tempo, tiam ĝi okazos la 19-an de septembro)

### Esperanto en Japana Radio

Laŭ informo de Jerzy Uspieński, Varsovio, la oficiala japana radio-kompanio NHK disaŭdigis la 30-an de julio 20-minutan programon pri Esperanto en Japanio kaj en la mondo, en rusa lingvo sur ondo 25 m (1195 kcs) je la 15,30 h laŭ moskva tempo. Santage okazis ripeto je la 22,00 h sur ondo 31 m (9605 kcs). La disaŭdigita artikolo estis mendita ĉe konata japana esperantisto kaj literaturisto, s-ro Kurisu Kei, far la redaktoro de la ruslingva programo de NHK.

### Ĉu Radio Prago denove en Esperanto?

Per letero de la 21-a de julio 1977 s-ro Lubomir Bradaček, Direktoro de la franclingvaj elsendoj de Radio Prago, sciigis al s-ro Henri Masson, Francio jenon: "Koncerne eventualan kunlaboron inter nia stacio kaj la ĉeĥa por-esperanta asocio, kaj ankaŭ kun la slovakaj televido, ni povas certigi al vi ke ni informiĝos, sed ni promesas nenion. Ĉiukaze, ni ne mankos vin informi. Ni dankas vin pro via sendo de Pilo-Press, en kiu la ĉeĥoslovaka radio estas menciita."